Lord George Gordon Byron ,

La suno de l' sendormulo

tradukita de Manfred Retzlaff

De l' sendormulo suno, fora stel',
Vi tremas larme en la nokt-malhel'.
Simbolo estas vi de l' nokta hor',
Egalas tute de l' feliĉ' memor'.
Ĉar tute same brilas lumo de
Pasintaj tagoj, sed varmigas ne.
Ĝin klare enaere vidas mi,
Sed fride el la foro lumas ĝi.[3][4]

Traduko de la Angla poemo "Sun of the Sleepless" de Lord George Gordon Byron *(∗1788-01-22 – †1824-04-18) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2014-12-11.*

Arg-1101-2222 (2014-12-11 16:12:21)

[3] aŭ: Sed tre malvarme lumas tiu ĉi.
[4] aŭ: Sed kiel fride lumas tiu ĉi!